

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ joulukuu ♦ decembro ♦ 6/2002



Eero Rinta-Karjanmaa, Anna-Liisa Heikkinen, Jukka Noponen, Mikko Mäkitalo, Päivi Saarinen, Timo Pirinen, Anna Ritamäki kaj Tiina Oittinen dum la estrarkunsida semajnfino. Eĉ dum vespermanĝo la aktivuloj diskutis. La sekretario havas la broŝuron de la VT-ejo en sia mano.

Membrigu kaj membrigu, p. 4 ♦ Vintraj Tagoj, p. 13
Jukka Pietiläinen doktoriĝis, p. 11 ♦ Muut lehdet, s. 22 ja takakansi



Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk tidskrift. Organ för Finlands Esperantoförbund.

Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

Toimitus/Redaktion/Redaktejo: ✉ esperantolehti@esperanto.fi

Päätoimittajaa etsitään, yhteydenotot puheenjohtajalle (Anna Ritämäki, yhteystiedot alla)

Ĉefredaktoro serĉata, kontaktu la prezidanton (Anna Ritämäki, kontaktinformoj sube)

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Mannerheimintie 40 D 86, 00100 Helsinki. ☎ ☎ (09) 587 6738 ✉ ilkka.santtila@esperanto.fi

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 15 •/vuosi/år/jaro;

Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 10 •; Baltio 10 •, aliaj landoj 13,50 •.

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

Julkaisija/utgivare/eldonanto: Suomen Esperantoliitto – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Eldonkvanto: 400

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja: *Anna Ritämäki*

Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito. ☎ (02) 423 146 ☎ (02) 423 246 ✉ anna.ritamaki@kolumbus.fi

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja: *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Sekretario/Sihtööri: *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ tiina.oittinen@pp.inet.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet:

Anna-Liisa Heikkinen, Asiakkaankatu 2 G, 00930 Helsinki. ☎ (09) 343 1449 ✉ annaliisa.heikkinen@surfeu.fi

Eila Martin, Intiönpolku 4 as. 36, 90100 Oulu. ☎ (08) 374 697

Synnöve Mynttinen, Koskenniskantie 5 D 39, 48400 Kotka. ☎ (05) 260 1326

Jukka Noponen, Viipurinkatu 27 A 12, 00520 Helsinki. ☎ (040) 5915767 ☎ ☎ (09) 1483871 ✉ jukka.noponen@iki.fi

Vicestraranoj/Varajäsenet:

Irja Miettinen, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta. ☎ (05) 453 0653 ✉ irja.miettinen@WWnet.fi

Raita Pyhälä, Jykyrintie 3, 69440 Lestijärvi. ☎ (06) 863 7351 ✉ raitapy@jymy.kase.fi

Eero Rinta-Karjanmaa, Poppelikatu 11-13 A 24, 15520 Lahti. ☎ (03) 783 4448

Kasisto/Rahastonhoitaja: *Anna-Liisa Heikkinen*

Asiakkaankatu 2 G, 00930 Helsinki. ☎ (09) 343 1449 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

Officejo/Toimisto: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaaja/automata respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

Ĉefdelegito de UEA/ UEA:n pääedustaja: *Heta Kesälä*

Kalamiehenkuja 3 D 32, 04300 Tuusula. ☎ ☎ (09) 275 5528

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800029-19438647 (maksut UEA:lle/ pagoj por UEA).

Internet: <http://www.esperanto.fi>

Favoraj kondiĉoj realisme

Vi denove havas Esperantan Finnlandon en viaj manoj. Tiujn ĉi gazetojn EAF eldonadis dum pioniraj, krizaj kaj brilaj tempoj kaj foje post paŭzoj. La lastajn numerojn legadis nia membraro kiel kutime, sed krome ili estis uzitaj en la instruado de kelkaj gimnazioj en mia hejmloka civitana instituto.

Mi kelkfoje vizitis la lokan kurson kaj ankaŭ anstataŭis mian patrinon kiel instruistino. Ni enkondukis ekzercon: elekti artikolon, skribu propralingvan resumon de ĝi (laŭ tio kion vi kredas vin kompreninta) kaj listigu dek novajn vortojn kun tradukoj (se vi trovas ilin en la vortaro). Kredeble Esperantolehti – Esperanta Finnlando – Esperantobladet kiel instruilo povas iom kontribui al realisma kompreno pri la esperantlingva mondo.

En Hungarujo nun miloj da studentoj ĉiujare studas la lingvon kaj trapasas la ŝtatan lingvoekzamenon. Ili elektas esperanton ĉar ili bezonas ekzameniĝi en iu lingvo, kutime ne pro brulanta interesiĝo pri la genia iniciato de Zamenhof (sed pro tio la iniciato ne iĝas malpli genia). Kutime, kiam ili ekzameniĝis, ili ne konas la esperantlingvan mondon. Malmultaj poste aktive uzas la lingvon.

Responde al la evoluoj en la eldonlando – la ŝtataj ekzamenoj – kaj en la komunika mondo – la retpoŝto – la eldonanto de la papera gazeto Eventoj decidis ne plu aperigi ĝin en 2002. Finiĝis ĝia epoko. Anstataŭe la eldonanto nun strebas alfronti la defion de la situacio en Hungarujo: la ekzamena sistemo estas favora al esperanto, kaŭzas

intereson pri studado inter multaj homoj, sed por la lernantoj estas malfacile trovi naturan uzon por sia nova lingvoscio. Ne eblas ĉion ĉiam fari same. Necesas adaptiĝi al la cirkonstancoj.

Kiel statas pri nia adaptiĝo al la cirkonstancoj en Finnlando? Ĉu ni sukcesas? Viaj komentoj estas bonvenaj. Sendube nia papera gazeto daŭre estas bezonata, sed certe ni povus utiligi interreton ankoraŭ pli. Ne hazarde ĝuste la informoj en la interreto instigas ĵurnalistojn kontakti nin kaj ebligas facilan aliron al korektaj faktoj. Mi kun surprizo povis konstati ĉi-jare – plurajn fojojn – ke la gazetaro raportas pri nia lingvo korekte, sen troigoj, prezentante nin realisme. Al mi ŝajnas ke ni estas sur la ĝusta vojo, ne nur EAF, sed la tuta esperantomovado – ni kreantoj de nia kulturo – spertas favorajn kondiĉojn. Kredeble ni ankaŭ iom meritas pozitivan atenton! Jen komfortiga penso en esperanta Finnlando.

Via prezidantino deziras al ni ĉiuj bonan jaron 2003.

Anna Margareta

PS. Ne nur aktivuloj gravas por esperanto, sed ankaŭ la aktivuloj inter ni gravas, kiel ni estraranoj seminarikunsidantaj dum du tagoj. Ni ne trovis la solvojn de ĉiu organiza problemeto, sed multon ni traktis. Ni daŭrigos la ellaboradon de informa strategio. Mi mem strebas iom ripozi de la EAF-taskoj dum januaro kaj la vicprezidanto portempe havos iom pli fortan kunordigan rolon ol kutime. (amr)

(R)estu membro de la E-komunumo!

Mi volas rediri al vi, kial indas esti kaj resti membro de la Esperanto-komunumo. La samon pli-malpli mi jam diris pasintjare, kaj mi restas nunsamopinianta. Esence al la ĉiama demando: “Kial finfine mi devus aliĝi al la loka Esperanto-klubo, al la nacia landa asocio, al la asocio de mia fako aŭ hobia, al Universala Esperanto-Asocio?” mi kutimas respondi, ke ekzistas almenaŭ du kialoj:

1) La Esperanto-asocioj je ĉiuj niveloj laboras por pli bona mondo, por mondo sen lingva kaj kultura diskriminacio; mallonge dirite, ili laboras por lingva demokratio. Se vi opinias, ke tiu estas bona celo, vi certe volas subteni ilin. Aliĝante al via loka klubo aŭ al monda, nacia aŭ faka asocio (eventuale eĉ al ĉiuj tiuj), vi estos parto de tiu tutmonda Esperanto-movado, kiu de pli ol unu jarcento laboras por homaj lingvaj rajtoj je ĉiuj niveloj, kaj kiu provas konvinki la mondon, ke ankaŭ en la lingva-kultura kampo justeco valoras pli ol forto.

2) Samtempe vi eble ŝatas simple esti parto de la komunumo, kiu parolas la internacian lingvon Esperanto. Vi eble ŝatas renkonti aliajn parolantojn de Esperanto, vi ŝatas aĉeti librojn en Esperanto, vi ŝatas vojaĝi al fremdaj landoj, koni ties loĝantojn kaj eventuale eĉ esti gastigata de lokaj esperantistoj. Ĉion ĉi la membroj de Esperanto-asocioj faras des pli nature, estante daŭre informataj per siaj asociaj ligoj pri la revuoj, la libroj, la kongresoj, la ret-listoj kaj la ret-paĝoj, la korespond-anoncoj kaj la vojaĝ-ebloj je sia dispono. Kaj se vi apartenas al la komunumo de tiuj, kiuj normale ŝaltas sian komputilon antaŭ la matenmanĝo, vi trovos (aŭ jam tro-

vis), ke esperantistoj ĉeestas pli kaj pli en la tutmonda reto kaj serĉas kontaktojn kun similaj esperantistoj. La avantaĝoj de asocia membreco estas similaj ankaŭ ĉi-kaze. Ekzistas diversaj diskutgrupoj por UEA-membroj, ekzemple, kaj nuntempe ankaŭ eksperimenta eblo ricevi la revuon Esperanto per Interreto en komputila formato.

Do estas grave, ke vi klopodu aliĝi al Esperanto-organizaĵoj je ĉiuj niveloj (loka, landa, faka aŭ internacia). Ni kompreneble invitas vin aliĝi aŭ re-aliĝi al UEA, sed ankaŭ se vi aliĝas nur al faka asocio aŭ al via loka klubo, tio jam estas io bona; kaj se vi aliĝas ankaŭ al via landa asocio, tio estas io ankoraŭ pli bona, ktp.

UEA pretas ĉiukaze sendi al aranĝantoj de naciaj aŭ lokaj renkontiĝoj stokon da revuoj de UEA de la pasinta jaro kune kun cirkuletoj por disdonado al la partoprenantoj – oni devas tiurilate nur peti la Centran Oficejon. La celo de nia kampanjo estas “vastigi la komunumon”, tio estas vastigi la nombron de organizitaj kaj interligitaj esperantistoj je ĉiu nivelo. Nia ĉefa celo estas ke la membroj de ĉiuj Esperanto-organizaĵoj pliiĝu kaj estu en kontakto inter si. Oni vastigas la komunumon ĉefe per informado pri Esperanto kaj instruado de Esperanto, sed ankaŭ tio estas senefika en la longa daŭro, se la parolantoj de Esperanto ne poste iel restas kune.

Ni restas je via dispono por kunlabori kun vi pri tiu ĉi celo.

Renato Corsetti, Prezidanto de UEA
<renato.corsetti@co.uea.org>

Membrigu kaj membrigu

Ni multigu la individuajn membrojn de UEA: membrigu kaj membrigu!

La revuo lanĉis kampanjon. Ankaŭ iuj niaj anoj jam antaŭe menciis kiom gravas grandi la anaron de UEA. Sube vi trovas informojn pri la kampanjo kaj pri la uea-kotizoj por 2003! Mem remembrigu aŭ simple membrigu, kaj membrigu!

(Premioj haveblas – kaj mi supozas ke manke de difino de “nova membro” ĉiu povas mem taksu ĉu konsideri ankaŭ iaman individuan membron de UEA nove varbitan.)

Ĉiuj membrigoj, ankaŭ remembrigoj – kaj tiavoja fortiĝo de nia UEA – estas tre valoraj por ni ĉiuj.

Samtempe vi povas – se vi same kiel multaj inter ni intencas vojaĝi al Gotenburgo – pagi vian kotizon por UK. Se vi ne havas aliĝilon ĝi estas simple havebla de la reto aŭ de Heta Kesälä.

(amr)

UEA-membrokotizoj por la jaro 2003:

MG-membro, ricevas gvidlibron: 8 •
 MJ-membro, ricevas jarlibron: 20 •
 MA-membro, ricevas jarlibron kaj revuon Esperanto: 50 •
 DM-membro, dumviva MA-membro: 1250 •
 DMJ-membro, dumviva MJ-membro: 500 •

Malpli ol 30-jaraj ricevas krome Kontakto-revuon.

Tiuj, kiuj volas subteni agadon de UEA, povas membriĝi en Societo Zamenhof per pago de 100 aldone al sia membrokotizo.

Junularan Esperantomovadon eblas subteni per pago de Patrono de TEJO 60 • aldone al sia membrokotizo.

Abonkotizoj por eldonaĵoj:

Esperanto 32 • + aere
 Kontakto 19 •
 Monato 44 •
 Komencanto 15 •

La 88-a Universala Kongreso de Esperanto okazos 26.7.-2.8.2003 en Gotenburgo, Svedio.

Heta Kesälä estas je via dispono koncerne UEA-aferojn: Kalamiehenkuja 3 D 32, 04300 Tuusula. (09) 2755 528. <heta.kesala@pp.inet.fi>

Konto en Sampo: 800029-19438647

UEA:n jäsenmaksut vuonna 2003:

MG-jäsen, saa opaskirjan: 8 •
 MJ-jäsen, saa vuosikirjan: 20 •
 MA-jäsen, saa vuosikirjan ja Esperanto-lehden: 50 •
 DM-jäsen, ainajjäsen luokassa MA: 1250 •
 DMJ-jäsen, ainajjäsen luokassa MJ: 500 •
 Kaikki alle 30-vuotiaat MJ-, MA ja DM-jäsenet saavat lisäksi mm. Kontakto-lehden.
 UEA:n toimintaa voi tukea Societo Zamenhofin jäsenenä 100 euroa jäsenmaksunsa lisäksi. Nuorten toimintaa voi tukea TEJO:n tukijäsenenä maksamalla 60 euroa.

Joidenkin julkaisujen hintoja:

Esperanto 32 • + lentopostilisämaksu
 Kontakto 19 •
 Monato 44 •



La revuo Esperanto lanĉis kampanjon

MEMBRO-MEMBRON!

Se ĉiu el ni akirus nur unu novan membron, UEA kaj TEJO duobliĝus. Multaj esperantistoj membriĝus en UEA/TEJO, se iu proponus tion al ili! La kampanjo MEMBRO-MEMBRON! estas samtempe konkurso. Ĝi daŭros ĝis la fino de januaro 2003.

Ĉiu membro de UEA/TEJO, kiu akiros novan individuan membron (en ajna kategorio), ricevos libropremion kaj lia nomo aperos en la Revuo Esperanto. Unu konkurso (decidos loto) ricevos La Novan Plenan Ilustritan Vortaron de Esperanto. Ekzempleron de La Nova PIV ricevos ankaŭ membro, kiu akiros la plej multajn novajn membrojn. La lotumado okazos la 10-an de februaro 2003. La rezulto aperos en la marta n-ro de la revuo.

La kondiĉoj: bonvolu rete aŭ skribe informi la redaktoron (Stano Marĉek, *revuo@uea.org*) ke vi akiris novan membron: skribu vian nomon, vian UEA-kodon, la nomon kaj la adreson de la (de vi akirita) nova membro. Post alveno de la kotizo (eblas ankaŭ donaci ĝin!) vi eniros la konkurson.

Helpu ankau vi vastigi nian komunumon!

Stano Marĉek

▷ Komencanto 15 •

88. Esperanton Maailmankongressi pidetään Göteborgissa Ruotsissa 26.7.-2.8.2003.

Kaikissa UEA:ta koskevissa asioissa apua antaa Heta Kesälä, Kalamiehenkuja 3 D 32, 04300 Tuusula. (09) 2755 528. <*heta.kesala@pp.inet.fi*>

Sampo-tili: 800029-19438647

La Euroscola- partopreno ekhavas formojn

La varbado por semajnfina kurso en Kimito-Kemiö en novembro ne sukcesis, sed por kurso en marto (vidu malsupre) mi jam havas tri partoprenantojn. Krome mi instruas ĉiumerkrede al naŭ gimnazianoj kaj unu instruistino en kurso de la loka civitana instituto.

Granda progreso por la Euroscola-projekto de ELFI estas ke jam du gimnazioj anoncis intereson funkcii kiel organizanta lernejo, unu por 2004 kaj unu por 2005. La vojaĝoj okazos printempe, sed la ekzaktajn datojn ni ekscios nur ĉ. ses monatojn antaŭ la vojaĝo.

La ideo estas ke la organizanta lernejo mem sendas ĉ. 20 lernantojn al Strasburgo kaj restos 12 lokoj por esperantoparolantaj lernantoj de aliaj lokoj. Se estas pli ol 12 tiaj junuloj oni devas aŭ elekti la plej talentajn aŭ trovi novan organizantan lernejon.

Se ĉio glate iras al Euroscola samtempe partoprenos similaj grupoj de aliaj landoj. Jam de komenco ni serĉas tiajn kunlaborantaj lernejojn kaj la partoprenontoj interkonatiĝas per korespondado. Eĉ se ne sukcesos ke ĉiuj tiaj lernejoj samtempe estos en Strasburgo jam la korespondado montras al multaj homoj ke esperanto estas viva lingvo. Tion ilustras la letero kiun Elizabeth Stanley en Anglio sendis al nia kurso la 7an de novembro:

Kara Carola,

Mi ricevis hodiaŭ viajn leterojn – bonŝance,

ĉar nia klubo kunvenas jaŭde. Do ni povis legi ilin tuj! Mi provos respondi baldaŭ, sed ne povas, kompreneble, promesi! La poŝtmarkoj tre plaĉis al unu el niaj instruistoj, kaj li demandis ĉu multaj homoj en Finnlando parolas Esperanton. Mi havas nun sur tabulo en mia klasĉambro leterojn el Germanio, Finnlando, Svedio, Bulgario kaj Litovio, kaj miaj lernantoj – ne nur la Esperantistoj – tre interesas pri ili. Almenaŭ nun en mia lernejo ĉiuj scias ke estas malvere diri ke “neniu parolas Esperanton”!

Elizabeth

Jam nun indas por junuloj kiuj regas la lingvon aŭ partoprenas en iu ajn kurso anonciantan intereson por partopreno en Euroscola per la aliĝilo malsupre aŭ doni la saman informon rete. Por estontaj esperantistoj estos multaj eblecoj, ekz. la sekvontaj kursoj, pri kiuj mi esperas ke vi informos viajn konatulojn. La kursoj estas por junuloj nask. 1985 aŭ poste kaj por instruistoj, kiuj poste povas instrui la lingvon en siaj lokaj lernejoj.

La celo de nia projekto ja estas ke esperanto estu lingvo por Euroscola-vojaĝoj ankoraŭ post la fino de la projekto mem. Tial ni bezonas instruistojn en multaj lernejoj tra Finnlando. La laborfolioj por helpi la novajn instruistojn instrui laŭ Mazi nun estas skizitaj por Mazi I kaj espereble nia laborgrupo povas kontroli ilin ĝis fino de februaro.

Kevään kurssit Kemiössä

Mazi I, maaliskuussa 2003

Aika: 1.-2.3, saapuminen 28.2 illalla (Helsingistä 17.15, Turusta 18.10 tai 20.55)

Paikka: Källkullen, Kemiö

Hinta: Opetus, oppikirja (Mazi en Gondolando) sekä täysihoito 53 EUR.

Mazi II, huhtikuussa 2003

Ennakkotietoa: Mazi I tai toinen vähintään 20 tunnin alkeiskurssi

Aika: 3.-4.4, tulo 2.4 illalla

Uusi oppikirja Ludoviko Zamenhof de Lars Forsman. Muuten kuten Mazi I.

Ilmoittaudu kursseille tai Euroscolamatkalle lähettämällä alla oleva lomake osoitteella Carola Antskog, 25700 Kemiö tai samat tiedot sähköpostitse <cantskog@kolumbus.fi> Lisätietoa myös puhelimitse (050) 581 7272.

Ilmoittautumislomake

Kyllä, haluan päästä Euroscola-matkalle keväällä 2004 2005

Osaan jo esperantoa

Haluan osallistua kurssille

Mazi I Mazi II

Nimi: _____

Syntymäaika: _____

Koulu ja luokka: _____

Osoite: _____

Puhelin: _____

Esperanta fabelkonkurso 2002

En 2002 la literatura-kultura edukejo Pää-talo-instituto, kies sidejo estas en la nord-finnlanda Taivalkoski, aldonis por la tria fojo Esperanto-branĉon al sia fabelkonkurso por infanoj, kiun ĝi organizas ekde 1993. Ekde 2001 la Esperanta branĉo estas auspiciata de UEA. La aldonon de Esperanto iniciatis la t.n. vilaĝa asocio de Metsäkylä, unu el la vilaĝoj en la komunumo Taivalkoski. Tie disvolviĝas vigla Esperanto-agado jam de pluraj jaroj, kies motoro estas s-ino Aini Vääräniemi, kiu nuntempe estas ankaŭ prezidanto de la vilaĝa asocio.

La ĉi-jara rikolto ne estis nombre kontentiga, ĉar partoprenis 14 fabeloj el ok landoj. La ĵurio tamen trovis inter ili sufiĉe kvalitajn verkojn por aljuĝi tri premiojn en ĉiuj tri aĝkategorioj. La ĵurion konsistigis Sylvia Hämäläinen kaj Raita Pyhälä (Saliko) el Finnlando kaj István Ertl el Belgio. La rezultojn oni publikigis samtempe kun tiuj de la finna konkurso en Taivalkoski en la naskiĝtago de la verkisto Kalle Päätaalo, la 11-an de novembro.

En la kategorio de infanoj ĝis 9-jaraj la unuan premion gajnis *Francesco Bentigvoli* (Italio), la duan *Alina Calibe Brucker* (Germanio) kaj la trian *Benedetta Ravaglia* (Italio). Inter 10-11-jaraj venkis *Paulina Christiansen* (Svedio), la duan premion gajnis *Niina Tauriainen* (Finnlando) kaj la trian *Jana Herbst* (Latvio). *Stefani Strunjak* (Kroatio) venkis inter 12-14-jaruloj, *Ivana Milijic* (Serbio) iĝis la dua kaj *Kirsi Tauriainen* (Finnlando) la tria.

La ĉefpremion "Fabelo Internacia" por la

plej bona fabelo de la tuta konkurso, ricevis la 12-jara Stefani Strunjak el Kroatio pro sia fabelo "Kiel formikbebo savis la formikejon kaj konatiĝis kun Avo Frosto". Stefani partoprenis en la konkurso ankaŭ en la du antaŭaj jaroj: en 2000 ŝi ricevis la duan kaj en 2001 la trian premion de sia aĝkategorio.

La sukceso de Stefani ricevis vastan reeĥon en kroataj amaskomunikiloj. La nacia informagentejo peris la novaĵon al la informiloj de la lando. Pluraj gazetoj intervjuis Stefani, ekz. en la plej granda kroata tagĵurnalo "Vecernji list" la intervjuo okupis duonan paĝon. La Kroata Radio elsendis duonhoran intervjuon en porinfana programero kaj ŝi aperis ankaŭ en televido.

Ĉar Stefani ne povis partopreni la premiadon en Finnlando, en Zagrebo ekestis la ideo, ke la finna Julavo transdonu al ŝi la premion okaze de sia vizito al Zagrebo en la tago de Sankta Nikolao la 6-an de decembro. Pri la ideo entuziasmiĝis la finna ambasado kaj proponis ĝin al Päätaalo-instituto, kiu siavice kontaktis la oficejon de Julavo en Laponio por aranĝi la praktikajojn. La Julavo efektive transdonis la premion al Stefani sur la ĉefplaco de Zagrebo en ĉeesto de dudekmil homoj kiel programero de granda muzika kaj danca spektaklo, kiun oni okazigis honore al la vizito de la Julavo. La Kroata Televido poste elsendis la tutan eventon.

Ege malofte la transdono de premio de Esperanta literatura konkurso ricevas same grandan publikan atenton. La ĉefa merito pri tio apartenas al Stefani Strunjak, sed ne laste

Uzinda legolibro

*Boris Kolker, Vojaĝo en Esperanto-lando
Perfektiga kurso de Esperanto kaj Gvidlibro pri
la Esperanta kulturo, 279 p.
UEA, Rotterdam, 2002*

La libro enhavas centon da variaj legaĵoj de 75 aŭtoroj, inter kiuj troveblas tiaj eminentuloj kiaj Zamenhof, Piron/Valano, Kalocsay, Waringhien, Auld, Boulton, sed ankaŭ malpli konataj kvankam konindaj esperantistoj el pluraj landoj. Pri la verkoj kaj verkistoj, eventoj kaj E-historio Kolker ĉiam donas bazajn faktojn en la komentarioj, kiuj igas la libron kvazaŭ moderna enciklopedieto pri Esperanto. Tio ja estas tre utila, ĉar en “Enciklopedio de Esperanto”, aperinta antaŭ dekoj da jaroj redaktite de Kökeny kaj Bleier, kompreneble mankas informoj pri pli ĵusaj agado kaj agantoj.

Se vi pensas, ke vi jam legis “Vojaĝon en Esperanto-lando” antaŭ kelkaj jaroj, vi supozeble pravas, sed la nuna, renovigita eldono estas presita sur bona papero kaj la nigra-blankaj ilustraĵoj estas laŭdinde variaj. Ne malgravan rolon ludas la desegnaĵoj de F. L. Veuthey kaj la abundaj fotoj pri Esperanto-eventoj kaj esperantistoj, kiuj igas la lernolibron interesa kaj historia fotoalbumo.

La tekstaro estas de pli multnacia deveno ol en la unua eldono, kvankam la kunliganta fadeno ankaŭ nun estas la oftaj kunvenoj de rusa E-klubo, kiu estas mirinde agema kaj progresema. Dankon al la klubvesperoj, la kompilinto de la libro povas reklami al la legantoj multajn utilajn kaj modernajn kromlegaĵojn.

La celoj de Kolker estas plivigligi la vivon de E-klubo kaj lernigi la legantojn pri la Esperanta kulturo. Mia opinio induz uzi la libron kiel bazon por diskutoj en progresema grupo aŭ dum somera kurso. Kvankam sperata gvidanto estus utila, la legaĵoj, eĉ sen instruisto, povas esti uzataj de ajna grupo, kies membroj jam havas meznivelan aŭ pli riĉan vortostokon kaj ŝatas studi kaj interparoli en Esperanto por atingi eĉ pli altan lingvonivelon. Al mallaboremuloj aŭ komencantoj la libro ne taŭgas. Oni povas elekti la tekstojn kaj taskojn en kiu ajn ordo, laŭ sia plaĉo, kvankam ili estas milde gradigitaj. La taskoj estas variaj kaj verkigaj/paroligaj. Ĝuste tial oni plej profitus de ili en grupo; se oni legas sola, oni ne povas kompari siajn solvojn kaj opiniojn kun tiuj de aliaj. Kunlaboro surbaze de la libro de Kolker certe estos amuza kaj instrua. Ek al iu Libroservo!

Saliko

ankaŭ al ŝia energia instruistino Judita Rey-Hudacek, sen kies iniciatemo ĉio ĉi ne estus ebla.

Kvankam oni ne povas esperi pri simila publikeco ĉiujare, la konkurso de Päätalo-instituto efike kontribuas al la informado pri Esperanto kaj aparte pri ĝia kvalito kiel literatura lingvo. Por Päätalo-instituto gravas unuavice la ĉefa celo de la konkurso, t.e. instigi infanojn al krea verkado, sed la Es-

peranto-movado devus pli ol ĝis nun konscii pri la bona ŝanco, kiun la konkurso de “normala” literatura instituto prezentas ne nur por informado pri Esperanto sed antaŭ ĉio por kulturado de la Esperanto-instruado inter infanoj. Espereble en 2003 la konkurso allogos pli da partoprenantoj.

*Osmo Buller
Direktoro de Päätalo-instituto*

Raportoj el Japanio

HORI Jasuo, Raportoj el Japanio 1-5
Libroteko Tokio

La kvin volumetoj de raportoj aperis 1997-2002, sed la unuaj estis skribitaj jam en 1991. En ili HORI Jasuo rakontas pri japanaj vivo kaj kulturaĵoj: festoj, moroj, tradicioj, kurentaj politikaĵoj, sportaĵoj, ekonomio, lernejoj, universitatoj, naturo. Unuj raportoj estas kvazaŭ intimaj leteroj, aliaj estas pli oficiale ĵurnalistaj. Ĉiu volumeto, kies paĝokvanto varias inter 85 kaj 200, enhavas mapon kaj ĝisdatigitan statistikon pri Japanio, en pluraj troveblas mallonga skizo pri japana historio. Aldone, videblas desegnaĵoj kaj fotoj pri aĵoj, kiujn estas malfacile priskribi nur vorte. La kovrilojn ornamas koloraj desegnaĵoj de la aŭtoro pri floroj, folioj, semoj fugoj kaj aliaj naturaĵoj.

Ni okcidentanoj ofte havas tre malklarajn – kaj malklerajn – ideojn pri Japanio. Ili povas baziĝi sur fantaziaj filmoj, sur romanoj kaj arto, sur la historio de pasintaj eraoj. Nun ni havas bonegan ŝancon ĝisdatigi kaj kom-

pletigi nian scion legante la diversajn artikolojn de sinjoro Hori. Ili estas en sufiĉe simpla Esperanto. La teksto estas zorgeme korektlegita, do, ni malofte stumblos pro mistajpaĵoj kaj eraroj, sed sentebblas tikla nuanco de fremdo kaj ekzotiko.

La verkadon s-ro Hori komencis por plibonigi sian lingvoscion en Esperanto. Li rimarkis, ke liaj raportoj plaĉas al geamikoj kaj revuoj, ekzemple al *Monato* kaj *Senacieca Revuo*. Do, li daŭrigas, kaj multaj legantoj dankas lin pro tio. Profesie li estas instruisto pri la angla, laste en universitato. Li ankaŭ kompilis lernolibrojn pri la angla. Liaj hobiaĵoj estas ŝakuhaĉi (japana muzika instrumento), biciklado, desegnado kaj pentrado, birdo-observado kaj montogrimpado. De ĉio tio venas la variaj temoj de liaj raportoj. Jen kaj jen inter ili aperas raportoj ankaŭ pri aliaj landoj (Belgio, Estonio, Finnlando, Francio, Germanio, Hungario, Jugoslavio, Pollando...) senditaj de liaj geamikoj. Al mi plej plaĉas la veraj japanaĵoj, kiaj la

kapklina saluto, bonaŭguraj pupoj kaj aliaj objektoj, manĝaĵoj ekzotikaj al ni, klarigoj pri japanaj literoj kaj ties uzo en komputiloj. Ĉiu (mal)amiko de Japanio nepre konatiĝu kun la Raportoj, precipe antaŭ/post vojaĝo Japanien!

Saliko

Hori Jasuo en japana tradicia kostumo, kun muzikilo ŝakuhaĉi (bambua vertikala fluto). Apud li koto-ludistino kun instrumento maldekstre de ŝi.



Pietiläinen doktoriĝis pri ĵurnalismo en Karelio

Jukka Pietiläinen defendis sian doktoran disertacion "La regiona gazeto en la post-soveta Ruslando" en la Universitato de Tampere la 5-an de oktobro. La studo esploras ŝanĝojn en la rusa gazetaro dum la politikaj reformoj fine de la 1980-aj jaroj kaj post la kolapso de la soveta sistemo. La fokuso estas sur la regiona nivelo kun Respubliko Karelio kiel ekzemplo. Ankaŭ esperantaj kontaktoj helpis al la aŭtoro profundiĝi en la Ruslandan kulturon. La disertacio havas Esperantan resumon.

– Mi ankaŭ mencias esperanton kaj esperantistojn en la teksto, la aŭtoro rakontas. Temas pri citaĵo el libro "Legendoj pri SEJM" de Mikaelo Bronstejn en kiu li rakontis ke sovetaj esperantistoj sukcesis aranĝi tendaron apud Tihvin malgraŭ malpermeso fare de lokaj aŭtoritatuloj. Tio atestas pri la fakto, ke la Soveta socio ne estis plene kontrolita de la aŭtoritatuloj kaj ke la civitanoj povis mem organiziĝi en limigita formo.

La disertacio estas rezulto de plurjara esplorklaboro. La unuan vojaĝon la aŭtoro faris en Petrozavodsk, la ĉefurbo de Karelio, jam en 1995. Parto el la sama materialo aperis en la finna lingvo en licencula disertacio kiu pretiĝis en 1998.

La libro aperas kaj en formo de libro kaj en interreto. Resumoj kaj prezentado de la libro legeblas en la retpaĝo <<http://www.uta.fi/~tijupie/vaitoskirja.html>>.

Tie troviĝas ankaŭ ligo al la teksto de la interreta versio. Eblas legi la Esperantan resumon kaj rigardi fotojn de la doktoriĝa festo. La anglalingva disertacio originale no-

miĝas "The Regional Newspaper in Post-Soviet Russia: Society, Press and Journalism in the Republic of Karelia 1985-2001", 532 p., ISBN 951-44-5454-5, eld. Tampere University Press. Eblas mendi la libron ĉe librovendejo de la Tamperea universitata biblioteko kontraŭ 27 eŭroj plus sendokostoj.

Pietiläinen estis i.a. prezidanto de Esperanto-Asocio de Finnlando (1994-98) kaj LKK-ano de la Tamperea UK (1995). Li estas fakdelegito de UEA pri ĵurnalismo.

*Informis Osmo Buller
kaj Jukka Pietiläinen*



La oponentino Jelena Vartanova de Moskva Ŝtata Universitato, la doktoriĝinto Jukka Pietiläinen kaj la profesoro Kaarle Nordenstreng. (Foto: Jorma Kasanen)

La revuo Esperanto havebla ankaŭ rete

La revuo Esperanto ekde 2003 estos abon-ebla ankaŭ en elektronika formato. Individuaj membroj-abonantoj de UEA rajtos aldone kaj senpage mendi la revuon en unu el la elektronikaj formatoj oportuna por ili: HTML, simpla teksto aŭ PDF. La mendojn akceptas la ret-adreso <reto@uea.org>.

La elektronika revuo estos sendata al la mendintoj rete baldaŭ post la finredakto de la papera versio kaj antaŭ ol ĝi dissendiĝos per ordinara poŝto.

Kompreneble, spertinte la novan servon, ili rajtas ankaŭ rezigni pri ricevado de la papera versio.

La elektronika versio de la revuo estos abonebla ankaŭ por la esperantistoj loĝantaj en B-landoj, kiuj ne estas membroj de UEA aŭ abonantoj de la papera versio de la revuo. La kosto de la servo estas fiksita kiel duon-igita B-landa abonkotizo: 7,50 eŭroj.

Nova Eo-gazeto pri humuro kaj bildstrioj en Esperanto

Ĝus aperis nova gazeto, kies nomo estas Vola Püg! Volapük-lingva gazeto? Ne, Esperanto-gazeto, nur pri humuro kaj komiksoj en esperanto.

Temas pri reta gazeto, tute senpaga (sed ĉu senpuga?), kiun vi povos malkovri ĉe la jena adreso: <www.volapug.net>. Tuj iru, malkovru, kaj eĉ abonu la (ankaŭ senpagan) dissendoliston, kiu informos vin pri la apero de ĉiu nova numero de tiu neregulara gazeto! Reta kontaktadreso: <hodos@volapug.net>.

*Sebastien Erhard en NUN
www.esperanto.se/nun/*

Ĉiutagaj politikaj novaĵoj en Esperanto

Verŝajne sola en la mondo ĉiutaga novaĵlisto kun informoj pri politika vivo aperas en Abonu.com – temas pri 'Ĉiutagaj aktualaĵoj de Pola Radio'. En ĉiu labora tago en ĝi aperas informoj pri la politika vivo en Pollando kaj Eŭropo – vidpunkte de Pollando.

Por ekaboni vizitu la retpaĝon <http://abonu.com/catalog/socio.polonia>

Andrej Grigorjevskij en NUN

Filologoj kantis Esperante

"Frat' Jakobo", kunkantata Esperante, estis la lasta programero en la inaŭguro de la nova domo de la filologiaj institutoj en Universitato de Helsinko la 22-an de oktobro. La programon de la inaŭgura festo planis Andrew Chesterman, profesoro pri multlingva komunikado, kiu volis ke post la prezentoj de la diversaj lingvaj institutoj oni finu la oficialan programon per kanto, kiu estas en nenies gepatra lingvo.

Tial fine de la programo Jouko Lindstedt, profesoro pri slava filologio, faris etan paroladon en Esperanto, kaj ĉiuj filologoj kanone kantis "Frat' Jakobon".

Aki Kaurismäki parolis "Esperante"

En la 50-jariĝa festo de la Nordia Konsilio Aki Kaurismäki ricevis la unuan Nordian Filmpremion. En liaj dankvortoj li diris, ke ĉar oni aŭdis tiel malmulte da finna lingvo en tiu festo, li faros sian paroladon en la finna kaj en Esperanto. La parolado konsistis el nur kelkaj vortoj: "Ensin suomeksi: tämä on minulle suuri kunnia ja minä kiitän kaikkia. Ja sitten esperantoksi: tack."

Vintraj Tagoj de EAF en Lahti

la 22an kaj 23an de marto 2003

Sonoj, bildoj kaj sonbildoj

(*Ĵaniĵ, kuvia ja ĵĵnikuvia*
– *Ljud, bilder och ljudbilder*)

Esperanto-Asocio de Finnlando invitas al Lahti, grava urbo por la radio kaj televido en nia lando, por trakti ĝuste radion kaj televidon. Ni spertos sonojn, bildojn kaj sonbildojn kaj sub gvido de Katja Lampinen ni lernos kiel prepariĝi por intervjuo. Ni vizitos la muzeon pri radio kaj televido, spektos filmojn kaj aŭdos radiajn elsendojn. Vespere ni ĝuos diversajn programetojn, eble ankaŭ esperantlingvan karaokeon kaj konkurson pri filmomalmutigo ... Viaj kontribueroj ankoraŭ povos trovi lokon en la programon.

Sabate niaj membroasocioj povos kunsidi. Pri loko kaj tempo bv. kontakti la sekretarion de EAF Tiina Oittinen. Dimanĉe okazos la jarkunveno de Esperanto-Asocio de Finnlando. Venu al ĝi – opiniu kaj proponu, ankaŭ pliaj kandidatoj por la estraro bonvenas!

Dum Vintraj Tagoj ni ankaŭ aparte memoros niajn subtenantojn, la anojn de societo Nino Runeberg. Ĉu vi scivolas kiel aliĝi al la rondo de Nino Runeberg? Estas simple. Pagu la sumon, 36 eŭroj, al la konto de EAF. (La kontonumero same kiel la aliajn kontaktinformojn vi trovas sur p. 2.)

La ejo Lahden kansanopisto (popolaltlernejo de Lahti) estas konata por multaj inter

Aliĝilo Mi aliĝas al la Vintraj Tagoj de EAF
22.-23.3.2003

Nomo _____

Adreso _____

Tel./Fakso/Ret-adreso _____

Aliĝkotizo: •

12 • ĝis la 15.1.2003 _____

16 • ĝis la 28.2.2003 _____

20 • ekde 28.2.2003 _____

Duono por FEJO-anoj sub 30 jaroj. Senpage infanoj sub 15 jaroj kaj personoj loĝantaj ekster Finnlando.

VT-paketo: •

55 • VT-paketo (tranokto,
2 lunĉoj, 2 kafoj, vespermanĝo) _____

30 • VT-paketo sen tranokto
(2 lunĉoj, 2 kafoj, vespermanĝo) _____

Entute pagenda al la konto de EAF _____

Deziroj koncerne tranokton aŭ manĝojn:

Bonvolu sendi la aliĝilon al:
Esperanto-Asocio de Finnlando
Siltasaarekatu 15 C 65
FIN-00530 Helsinki

Pagoj al la konto: Sampo 800017-230825.

Bonvenon!

Ilmoittautumislomake

Ilmoittaudun Suomen Esperantoliiton Talvipäiville 22.-23.3.2003

Nimi _____

